
# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-01 n-ro 372

# Interstela asteroido gastiĝas en nia sunsistemo



Burkino: interbataloj okazis marĝene de la alveno de la Franca Prezidento Emmanuel Macron ĉe la universitato de Uagaduguo

Internacia Tago por la Elimino de Perforto kontraŭ Virinoj

Sekureca Konsilio de UN okazigis urĝan kunvenon pri misil-pafo de KDPR

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

**Burkino: interbataloj okazis marĝene de la alveno de la Franca Prezidento Emmanuel MACRON ĉe la universitato de Uagaduguo**
*Unua oficiala vizito en Afriko p. 03*

**Sekureca Konsilio de UN okazigis urĝan kunvenon pri misil-pafo de KDPR**
*Haltigi provokajn agojn p. 04*

**Internacia Tago por la Elimino de Perforto kontraŭ Virinoj**
*Traduko al esperanto de la Virina Manifesto p. 04*

**Interstela asteroido gastiĝas en nia sunsistemo**
*Venis de alia stelo p. 05*

**Senbesta agrikulturo**
*La agrikulturo pli forte devas okupiĝi pri la protekto de la klimato p. 06*

**En 2019 komenciĝos amasproduktado de la unuaj flugantaj aŭtoj**
*Vertikale leviĝantaj kaj malleviĝantaj flugantaj aŭtoj p. 07*

**Hoddiaŭe**
*Ernst TOLLER; KOBAJAŜI Takiĝi; Mihály VÖRÖSMARTY; kaj Koalo p. 08*

# Burkino: interbataloj okazis marĝene de la alveno de la Franca Prezidento Emmanuel MACRON ĉe la universitato de Uagaduguo

La prezidento de la franca Respubliko diskursis okaze de sia unua oficiala vizito en Afriko.




La unuaj paŝoj en Afriko de MACRON, estis tumultaj. Post ĵeto de grenado kontraŭ francaj militistoj en Uagaduguo, kio okazigis tri vunditojn ĉe civiluloj, studenta manifestacio atendis la Ŝtatestron je lia alveno ĉe la universitato de la Burkina ĉefurbo, kie li diskursis la 28-an de novembro.

«For la imperiismon», skandis interalie kelkaj studentoj. Kiel rimarkis atestantoj, pneŭajoj estis flamigitaj laŭlonge de la vojoj, kiuj kondukas al la universitato de Uagaduguo, kaj la sekurecaj fortoj intervenis per impona uzado de larmigaj gasoj.

Laŭ atestantoj kaj ĵurnalistoj, kiuj sekvis la alvenon de la franca prezidento en Burkino, parto el la ne-oficiala eskorto estis mistraktita. Multaj veturiloj estis ŝtonatakitaj, kaj kelkaj el ili ekflamiĝis. Laŭ la ĉeestantaj amaskomunikiloj, neniu estis vundita, kaj la konvojo tamen sukcesis atingi sian lokcelon.

La studentoj afiŝis ankaŭ sloganojn kontraŭ la milita ĉeesto de Francio en la lando, kaj aliaj landoj de Afriko. Nur malgranda grupo de studentoj ricevis permeson eniri en la salonon, kie Emmanuel MACRON diskursis. Kaj la franca prezidento ensceniĝis, meze de aplaŭdoj.

Preskaŭ horon post la interbataloj okazintaj inter la manifestaciantoj kaj la eskortantoj, la poparolanto de la Palaco Elizeo, Bruno ROGER-PETIT liveris la oficialan version de la incidentoj. Li publikigis en Tvitero: «Dum ĉi-taga moviĝo, en Uagaduguo, veturilo de la delegacio suferis ŝtonatakon. Sed nek centoj da manifestaciantoj, nek detruitaj veturiloj okazis», dementante interalie tvitmesaĝon rapide nuligitan de la ĵurnalisto de *«Quotidien»*, Hugo CLÉMENT.

Li ankaŭ precizigis, ke «kiam tiu incidento okazis, Prezidento Emmanuel MACRON interparolis kun sia samrangulo, Prezidento KABORÉ». Dum Emmanuel MACRON diskursis en la universitato, interbataloj daŭris inter policistoj kaj kontraŭ-imperiismaj manifestaciantoj. Barikadoj kaj fajroj eĉ estis starigitaj sur la apudaj avenuoj.

Neniam Milito Inter Ni

# Sekureca Konsilio de UN okazigis urĝan kunvenon pri misil-pafo de KDPR



Merkrede [29 nov 2017] vespere la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj okazigis urĝan kunvenon pri refoja testa pafo de balista misilo fare de la Korea Demokratia Popola Respubliko, por diskuti kontraŭrimedojn.
Jeffrey FELTMAN, ĝenerala vicsekretario de UN pri politikaj aferoj informis la ĉeestantojn pri la okazaĵo.

La membroj de la Sekureca Konsilio unuanime forte kondamnis la agon de la KDPR, kiu malobservis rilatajn rezoluciojn de la Sekureca Konsilio kaj serioze minacas pacon kaj stabilecon de la regiono kaj la mondo. Ili urĝis la KDPR tuj haltigi provokajn agojn.

FELTMAN diris en la kunveno, ke Ĝenerala Sekretario de UN António GUTERRES forte kondamnas la refojan testan pafon. Li urĝis la KDPR haltigi agojn, kiuj rompas pacon kaj stabilecon de la regiono kaj la mondo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Internacia Tago por la Elimino de Perforto kontraŭ Virinoj




La Internacia Tago por la Elimino de Perforto kontraŭ Virinoj, kiu ekde 1981 estas celebrata spontane kaj ekde 1999 oficiale, laŭ UN-rezolucio 54/134, ne estas tre sentata en Esperantio: ŝajne nur en Svedio, okaze de studa tago organizita de la Esperanta Civito, oni memorigis ĉi tiun gravan daton.


La prezidanto de Feminisma Esperanta Movado, c-ino [anino de la E-Civito] Agneta EMANUELSSON, esprimis sian ĝojn pro la traduko al esperanto de la *Virina Manifesto* ellaborita de la Komitato de Verkistinoj de *PEN Internacia* por forte kondamni la fizikan kaj psikologian violenton kontraŭ ĉiuaĝaj virinoj. Ĝi estos publikigita en venonta numero de "*Literatura Foiro*", kio kaŭzis jam la gratulon de la prezidanto de *PEN Internacia*, s-ino Jennifer CLEMENT.

Tiu ĉi temo karakterizos la unuajn feminajn paĝojn ekde 2018 regule aperontajn en "*Literatura Foiro*", kiu tial riĉiĝos je pliaj ok paĝoj ĉiunumere.

HeKo 666 1-B, 29 nov 17

# Interstela asteroido gastiĝas en nia sunsistemo

Ĉeesto de la nedifinita objekto, fluganta tra nia sunsistemo, antaŭ ne longe kialigis urĝan laboron de observejoj en la tuta mondo. NASA konfirmis, ke tio ĉi estas la unua objekto, kiu venis de alia stelo kaj ĝi povas havi longecon je kvarono de mejlo. Malgraŭ la asteroido, nomata "*Umuamua*" tutcerte ne estas stirata de aliplanedanoj, ĝi povas doni al ni informon pri aliaj sunsistemoj.




Malfruoktobre sciencistoj ekopiniis, ke ili observas objekton, venintan el fora spaco, per la teleskopo *Pan-STARRS1* en la Havaja Universitato. La Internacia Astronomia Unio reapartenigis la objekton de kometo al interstela asteroido en sia prezento la 14-n de novembro. La asocia administranto de la Sciencmisia Direktoraro Tomas Curbuhen diris la 20-an de novembro dumprezente: "Dum dekoj da jaroj ni teoriumis, ke tiaj ĉi interstelaj objektoj ekzistas, kaj nun la unuan fojon ni havas pruvon de ilia ekzisto."

La magazeno *Nature* publikigis la esploron pri la trovaĵo, gvidata de sciencistoj de la Havaja Astronomia Instituto. NASA subvenciis la laboron. La stranga asteroido povis "vojaĝi tra la Lakta Vojo ne aliĝinte al iu stelsistemo dum centoj da milionoj da jaroj antaŭ ol ĝi ekhavis ŝancon trovi la nian", laŭ informo de la agentejo.

"*Umuamua*" signifas en la havaja lingvo "sendito el foro, veninta unua". Ĝi havas ruĝetan koloron kaj estas dekoble pli longa, ol larĝa, laŭ datenoj de NASA, kiu informas, ke ĉi dimensiaj parametroj estas malkutimaj por asteroidoj, observitaj antaŭe. Kaj ĝi havas diversan brilecon: "se juĝi per ĉi-faktoro, ĝi turniĝas unu fojon pro je 7,3 horoj." Ĝi ŝajnas esti densa, enhavanta metalojn kaj ŝtonojn sen glacio aŭ akvo kaj estis ruĝigita per kosma radioaktiveco.

Kelkaj surteraj teleskopoj daŭre observadas la asteroidon *Umuamua*. Ĝi estas proksimume 124 milionojn da mejloj for de nia planedo kaj eble estos jam tro fore mezdecembre por pluesplori ĝin. Ĝi moviĝos al la stelaro de Pegazo post forflugo el nia sunsistemo.

Kirill Noviĉenko
Interalie

# Senbesta agrikulturo

Senbesta agrikulturo pri kiu veganistoj revas, havas nekontesteble pozitivajn etikajn kaj ekologiajn efikojn. Sed ĝi starigas ankaŭ grandajn problemojn.



Unu el la malmultaj decidoj de la antaŭ nelonge finiĝinta konferenco pri la monda klimato en *Bonn*, Germanio estis, ke nun ankaŭ la agrikulturo pli forte devas okupiĝi pri la protekto de la klimato. Ĝis la jaro 2020 oni celas ellabori pri tio taŭgajn paŝojn. En la okuloj de veganistoj tio estus tute simpla afero: Se oni abolus la tenadon de bestoj, oni ne nur povus eviti la suferadon de bestoj, sed ankaŭ malaperus la duono de la enaerigo de forcejaj gasoj el la agrikulturo. Bovoj elruktas ĉiutage 300 ĝis 500 litrojn de la forta varmdoma gaso metano.

Sed tiel simpla la afero ne estas, kiel tion raportas usonaj esploristoj. Ĉar la konverto al vegana agrikulturo havus serion da neŝatataj konsekvencoj. La sciencistoj ellaboris sufiĉe ampleksan modelon de la usonaj agrikulturo kaj nutrado kaj tiel simulis mondon sen bestobredado. La rezultoj estas rimarkindaj. Unuflanke la konsekvencoj por la sano ne estus tute pozitivaj: Ĉe vegetara nutrado ŝanĝiĝas la proporcio inter la enhavo da energio kaj la kvantoj da gravaj enhavaj substancoj, kio kaŭzas la danĝeron ke averaĝa usonano devus konsumi (ankoraŭ) pli da nutraĵo por kovri sian bezonon ekzemple pri kalcio aŭ pri vitamino A. (Kaj necesas aldoni ke kelkaj mikronutraĵoj, ekzemple vitamino B12, troviĝas nur en bestaj nutraĵoj).

Aliflanke ankaŭ la efikoj al la medio ne estas tiel klaraj. Tiel sen bestobredado ne plu disponeblas organika sterkaĵo, anstataŭe necesus disporti pli da artefarita sterkaĵo sur la kampojn. Tiu sterkaĵo postulas por la produktado multe da energio kaj kondukas al altaj enaerigoj de karbondioksido; ĉe nura apliko de artefarita sterkaĵo malaltiĝas la enhavo da humo en la grundo kaj tiel malaltiĝas ties kapablo absorbi karbondioksidon. Krome ekzistas la risko ke ĉe malĝusta dozado enaeriĝos pli da ridiga gaso (kiu estas forta varmdoma gaso). Sume nur pro la manko de stala sterko la eblaj ŝparoj de varmdoma gaso reduktiĝus je proksimume unu sesono.

Sed la listo de problemoj de senbesta agrikulturo estas ankoraŭ pli longa: Kion oni ekzemple faru kun la restaĵoj de la plantoproduktado kiuj nuntempe servas kiel voraĵo por la bestoj? Kio okazus kun areoj kiuj ne plu estus paŝtataj - ekzemple la montaraj paŝtejoj? Kaj: Sen stala sterko ne eblas biologia agrikulturo.

Do ne ekzistas - kiel ĉie en la vivo - simplaj solvoj.

Esperanta Retradio



# En 2019 komenciĝos amasproduktado de la unuaj flugantaj aŭtoj

La teknologio iam uzata nur en sciencfikciaj filmoj estas nun pli kaj pli rapide fariĝanta parto de nia ordinara vivo. Lastatempe *Gelly*, aŭtokompanio en *Zhejiang*-provinco [浙江省 Zhèjiāng Shěng], sudorienta Ĉinio, konfirmis, ke ĝi aĉetis la usonan kompanion pri flugantaj aŭtoj *Terrafugia*, kaj ke ĝi planas komenci amasproduktadon de la unuaj flugantaj aŭtoj en 2019 en Usono kaj tiun de vertikale leviĝantaj kaj malleviĝantaj flugantaj aŭtoj en 2023.

En septembro ĉi-jare la ĉina kompanio *Tencent* fariĝis la ĉefa investanto de la nove starigita germana kompanio pri flugantaj aŭtoj *Lillium* pagante 90 milionojn da usonaj dolaroj. En la mondo estas pli ol 10 kompanioj, kiuj esploras kaj evoluigas flugantajn aŭtojn inkluzive de *Elevate*, kiu estas flugaŭta projekto de *Uber*; la slovaka kompanio *Aeromobile* kaj la nederlanda kompanio *PAL-V*.

Nun flugantaj aŭtoj estas uzataj nur en limigitaj kampoj, kiaj policaj aferoj, krizokaza savado, taksioj ktp..

Hodiaŭ la ĉefaj teknikaj baroj estas la nesufiĉaj kapabloj de daŭra flugado kaj de ŝarĝado. Ankoraŭ estos longa vojo ĝis flugantaj aŭtoj povos eniri en la komercan merkaton de Ĉinio ĉar intertempe necesos, ekzemple, malfermi aviadajn areojn por la flugantaj aŭtoj, trejni ŝoforojn kaj pretigi koncernajn leĝojn kaj regularojn.

Gao Shuyuan
El Popola Ĉinio



## Ernst TOLLER

Ernst TOLLER [enst tole] (naskiĝis la 1-an de decembro, 1893, mortis la 22-an de majo, 1939) estis germana verkisto.

En Esperanto aperis: *La Hirundlibro.*

Vikipedio

---

## KOBAJAŜI Takiĝi



KOBAJAŜI Takiĝi [Takiji Kobayashi 小林 多喜二 ] ; n. la 1-an de decembro 1903, m. la 20-an de februaro 1933) estis japana laborista (Proleta Literaturo) verkisto.

En Esperanto aperis: *Raportoj el Japanio; Historio pri Krabŝipo*.

Vikipedio

---



## Mihály VÖRÖSMARTY

VÖRÖSMARTY Mihály (naskiĝis la 1-an de decembro, 1800 Kápolnásnyék, mortis la 19-an de novembro, 1855 Pest (urbo)) estis hungara poeto, redaktoro kaj tradukisto.

En Esperanto aperis pluraj poemoj tradukitaj.

Vikipedio

---



## Bildo de la tago

Koalo (*Phascolarctos cinereus*).

Vikipedio